

Numero: 265.  
Junio: 2014.

22-a jarkolekto

## Literaturaj Folioj

# VESPERTO



Redaktanto:  
Apáti Kovács Béla  
Kaposvár  
Béla király u. 44.  
H-7400 HUNGARIO  
Telefona: 82/ 410-664  
Retadreso: [espbel@t-online.hu](mailto:espbel@t-online.hu)  
Eldonanto: Kapošvara Esperanto Centro  
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

## Someraj esperoj



Sunbrilo, rido, bonhumoro. Ĉiu ŝatas la someron kaj malpacience atendas ĉi kelkajn varmajn monatojn.

En tiu ĉi sezono oni vojaĝas eksterlanden kaj vizitas forajn urbojn.

Multaj homoj somere rekonas, kiom grava estas la lingvoscio. Kaj tiam oni decidas, ke nepre ellernos iun fremdan lingvon por ke en la estonto ne okazu ĝenaj situacioj, lingvaj miskomprenoj, kiuj povas malgajigi la eksterlandan ferion.

Ni hungaroj apenaŭ scias perfekte lingvojn. Kvankam en la baz- kaj mezlernejo ni lernas diversajn lingvojn dum longaj jaroj. Tamen post la lernojaroj el la lernitaj lingvoj ni scias apenaŭ ion.

Kio estas la kaŭzo, ke fiaskas la hungarlanda lingvoinstruado? Ĉu ni ne havas spertajn, bonajn lingvoinstruistojn?

Tion mi ne kredas. Laŭ mia scio, la famo de nia instrumentado vaste estas konata. La problemo ne en ĝi radikiĝas.

Ĉi paĝo estus malmulta detale esplori la aferon. Nur la ĉefan kaŭzon mi deziras montri, kiu malheligas la horizonton.

Hungario situas en la mezo de Eŭropo kaj el ĉiu flanko trafas nin diversaj kulturaj kaj politikaj influoj.

La ventoj, ofte ventegoj de la politiko traflugas super la lando kaj devigas la tie ĉi loĝantojn sekvi la novajn influojn.

Trarigardante la lastajn jardekojn ni vidas, kiom multfoje ŝanĝiĝis la politikaj interesoj. Mi timas ankoraŭ ni ne atingis la finon. Ĉiu scias en la fono tie kaŝiĝas novaj fortoj, kiuj povas forblovi la nunan kaj konstrui la sian, devigante novan lingvon kaj kulturon.

Kompreneble ankoraŭ multaj, aliaj aferoj formas nian interesiĝon lerni fremdajn lingvojn.

Oni scias, sed neniun kuraĝas eldiri: tiun ĉi problemon povus solvi neŭtrala lingvo kaj tiam eble la homaro komprenus unu la alian pli facile.

Oni timas proponi, tiu ĉi lingvo estu Esperanto. Dum ĝia pli ol centjara ekzisto pruviĝis, ke la zamenhofa lingvo estas vivkapabla, kaj ĝi estas bone uzebla sur ĉiu tereno.

Kio estas la kaŭzo, ke ankoraŭ la homaro ne akceptis ĝin unuanime?

Estu nia somera espero, ke la plurmiljara sonĝo de la homaro realiĝos.

-Redaktanto-

## Pola Retradio

Antaŭ multaj jaroj eĉ jardekoj kiam mi estis novbakita esperantisto ankoraŭ tiam ne estis tiom multe da radistacioj bone aŭdeblaj, kiel nun en la mondo de interneto. Ni ĝojegis, se ni sukcesis aŭdi kelkajn radiodisaŭdigon en Esperanto. Inter ili estis Pola Radio. Mi aŭskultis ĝin preskaŭ ĉiutage. Ho, la aŭskultado ne estis tiel simpla, kiel nun. Ni devis aŭskulti ĝin en ĝustatempo kaj krome la nivelo de aŭdebleco estis tre, tre malbona. Se ni malfruis, tiam ni ne povis aŭskulti novaĵojn, interesajn programerojn en Esperanto. Do tial ni klopodis ŝalti nian radioaparaton en la difinita tempo kaj ni serĉis la kanalon sur kurta ondo kaj mute aŭskultis la parolon en la etero.

Nun jam ĉio ŝajniĝis, ĉar interneto solvis tiujn ĉi malfacilaĵojn. Ni povas aŭskulti ĝin bonege, kvazaŭ apud mi estus sidanta la parolanto, kiam ajn ni povas aŭskultila elsendojn de Pola Radio. Ne estas necese rapidi por ke ni ne malfru la elsendon. La retradio ĉiam staras je nia dispono.

Mi volus se ankaŭ Vi fariĝus la aŭskultanto de Pola Retradio.

Jen ĝia adreso: <http://pola-retradio.org/>

### E elsendo el la 16.05.2014

Majo 16, 2014 | Enretigita de [Barbara Pietrzak](#)

Clay Magalhães, la Konstanta Kongresa Sekretario estas la gasto de la 334-a E-elsendo ĉe [www.pola-retradio.org](http://www.pola-retradio.org) dividante la informojn pri siaj aprila/marta vizitoj en la kongresurboj: Bonaero kaj Lille. Komence de la elsendo aŭdiĝas kulturaj informoj pri Nokto de Muzeoj en Varsovio kaj la sonorilo Johano Paŭlo la 2-a, la unuan fojon eksonoranta la plej proksiman dimanĉon sur Wawel-altaĵo en Krakovo. La E-informoj rilatas al akceptitaj terminologiaj staĝanoj kaj serĉataj staĝanoj de E@I. Fine de la elsendo sekvas leterkesta renkontiĝo. La kulturaj informoj kaj la interparolo troviĝas en la koncernaj rubrikoj de nia paĝo. Muzike akompanas nin fragmente la unua E-Tango el Svedio.



# Dolĉaj sonĝoj

-Verkis: Sonkoly Éva-

Apud la kafotaso ornamita kun orobordero pigre etendiĝis la kulereto. Iom pli malproksime staradis sukero, ĝi havis du orelojn... ĝi aŭskultadis.

-Vi diris tion, ke vi havis ankaŭ pli belajn tagojn – rigardis kaŝe la scivolema kulereto al la taso, kiu antaŭ nelonge alvenis el la vendejo.

-Ĉu mi rakontu? – ĝojegis la taso.

-Jes, se vi jam estas metita tien ĉi, sed mi ne scias por kio....

-Vi ekvidos, baldaŭ kuirigis la kafo, poste ankaŭ vi havos multe da laboro. Do – ekmemoris la taso – okazis antaŭ kelkaj jaroj, kiam matene mi eniradis – ĝi signis per sia forma prenilo al la pordo.

-Kiel? Ja vi ne havas piedojn – rigardis ĉirkaŭen la kulereto.

-Jes mi ne havas, sed oni povintus meti min sur pleton, sed... – ĝi paŭzis iomete – oni prenis min kaj tiel mi estis enportita.



-Kiu?

-Mi ne rememoras pri la nomo. Sed tio ne estas grava. Tio ne, sed kio okazis ene... nun atentu! Li ŝteliris al la lito. Ĝis tiam ĉio ĝlate iris, sed kiam mi estis enmetita en ŝian manon.... Mi tute ne komprenas, kiel ĝi povis okazi, do mi ekbaskulis kaj vane mi klopodis teni en mi la kafon. Ĝi elverŝiĝis sur la littukon.

-Kio ĝi estas?

-Ja vi scias, ĝia estas tia blanka io.... ĝis mateno ĝi ĉiam estos ĉifonita.

-Kial?

-Tion mi ne scias. Mi diris, ke mi iris tien nur matene.

-Ĉu poste?

-Unue ankoraŭ ili ridis pri tio, kvankam mi ne estas kulpa pro tio. Kaj subite li fariĝis kolera.

-Kiu?

-Tiu, kiu kuiris la kafon, bonvolu ne demandi tiom multe!

La kulereto klopodis meti sin forte apud la tason, kiel ĝi povis.

La kovrilo de la sukero ekleviĝis. Sukerkubo scivolemadis. Ĝi premiĝis sub la kovrilon, tio ekknarigis ĝin, kiam ĝi ekparolis:

-Mi rememoras pri tiuj tagoj, semajnoj, tiam ankoraŭ mi ne devis gardi tiun ĉi scivoleman brunan sukeron, ĉiam estis aĉetita blanka. Ja ĝi estis ankaŭ por mi pli bona.... – ĝi silentiĝis kaj ĝi frakasis la etan kubon je polvo.

-Mi sentas la odoron de la kafo – flustris la kulereto.

-Baldaŭe vi sentos ĝin pli bone kaj vi tute varmigiĝos – subridis la taso, kiu travivis pli bonajn tagojn.



Diligentaj fingroj metis la tason sur pleton kun la kulereto apud sian kunulon plenigante ilin per bonodora kafo. Poste sekvis la sukero elprenante el ĝi po du brunajn kubojn.

Ili ekiris en la ĉambiron. Neatendite la sonorilo eksonis. La pleto ekbaskulis. La du tasoj verŝis sur la verdkoloran ŝtonplankon, sian enhavon kaj ili disfalis je rompaĵoj.

-Nu, ili klaĉados pli pri neniu – murmuris la porcelana sukero kaj ĝi iris pli foren sur la tablo. Ĝi sciis, ankaŭ ĝi estas rompema.

Ĝi ankoraŭ aŭdis la pordomalfermon, sed ĝi vidis nenion, ĉar antaŭ ol fari ordon oni enmetis la ŝrankon. Tie ĝi vane orelumis, apenaŭ aŭdis ion.

-Ĉiam vi nur promesas la kafon – ĝi aŭdis por ĝi fremdan voĉon.

-Nu, – ĝi pensis – ŝanĝiĝas la tempo. Ankaŭ la homoj forpasas, kiel du tasoj.

Pri tio ĉi ĝi pensadis longe kaj poste ĝi ekdormis. Ĝi havis brunsukeran sonĝon.

-Tradukis: Apáti Kovács Béla-



# Poezio

# Poezio

## Babelo

Ivan Naumov

Donu al mi fabelon,  
Ĉar io almenaŭ restu,  
Ĉar io almenaŭ nestu  
En pingloza arbusto  
de mia obskura anim'...

Kiam oni eniros Babelon  
Ĉies vinoj restos sen gusto  
Kaj ŝimos en ŝlim'.

Donu al mi intencon  
Por io ankoraŭ tremu,  
Por iun ankoraŭ emu  
Longaj ŝtonaj strataroj  
de mia vintroza intern'.  
Kiam oni deklaras komencon  
Ĉies varmo restos sen tegoj  
En frosta kavern'.

Donu al mi nenion  
Laŭ jam forgesita moro.  
Laŭ jam forgesita foro  
Eble glitos ombraro  
de mia neĝoja esper'.  
Kiam oni ektrovos la Dion  
Ĉies dioj restos sen faro  
Kaj mortos sur Ter'.  
28/29.06.1993



## Floreto

Ivan Naumov

Mi kisas la vangon ŝatotan. Interne mi ridas –  
Pro kvanto da "o" en novelo de nia renkonto.  
Sed subas la ridon tremeto: mi jam ne sinfidas,  
Ĉar kreskas la dubo: ĉu *mi* tie restas venkonto?

Ne plue mi certas, ke havas animon el brikoj,  
Eternaj por tempo, tro firmaj por rompo kaj krevo...  
Jen – brikojn disportas popece hastemaj formikoj  
Por kre' de moskeoj formikaj al Amo kaj Revo.

Mi ĉasis Liberon, mi ŝatis matenan malplenon  
De l' ĉambro, de l' lito, de l' mondo – por nova  
vespero.

Sed nun – ĉu en plena frenez'? – mi serĉadas  
katenon,  
Tra miaj kirasaj ridetoj penetras sincero!..

Mi ŝtone rakontas: "Floreto, mi scias petoli.  
Min logas okuloj scipovaj kaj lagi kaj steli.  
Karonta, mi devas konfesi: kutima pli-oli,  
Mi kvazaŭ junulo – esperis kaj strebos plej-eli..."

Mi skize desegnas la mondon de navo laŭ tajdoj,  
De rajdo tra kampoj, enombra amoro sub pinoj.  
Kaj vi, grandokula, miranta, tuj preta al rajdoj,  
Kapklinas al mi, sur la ŝultron kun kalo pro klinoj.

"Aĥ ne, ne rapidu!.. Alteme: vi konas la kanton?..  
Gustumu: ĉi-jara apenaŭ similas realon."  
Kaj mi, menciante trankvilon, senplaŭdon kaj lanton,  
Per mano sunbruna plenigas kvarcvitran pokalon.

Ĉu-flustre, ĉu-pense mi gajas pri via destino:  
"Pretiĝu, floreto, mi havos timigan aŭdacon!"  
En kvara linio mi rimos vin... Eble, kun vino –  
Ĉar ĝuas la lipoj tuŝantaj la ruĝan surfacon.

15.03.92. *Vespere*



# Por infanoj

## La reĝo de la birdoj

Verkis: Benedek Elek

Ĉiam la aglo estis la reĝo del a birdoj. Sed en iu tago ili komencis malkontentadi pri sia reĝo.

-Kial estas bona por ni, ke la aglo estas nia reĝo, se ĝi ne zorgas pri ni! Ĉiu malbona homo, ĉefe ĉiu malbona infano estas nia malamiko, ili prirabas niajn nestojn, ili pelas nin, ŝtele ili pafadas nin. Ĉu nia reĝo defendas nin? Ja, ne. Ni elektu alian reĝon anstataŭ ĝi!

Ili interkonsentis, ke ili elektos alian reĝon, sed kiun? Kiel ili traktis, eĉ diskutis pri tio, ekaperis la strigo. Eh, al la birdoj tre ekplaĉis la saĝa vizaĝo de la strigo.



-Tian reĝon ni bezonas – pepadis la birdoj entuziasme kaj pro la granda ĝojo ili aplaudis per siaj flugiloj. – Vivu! Vivu! La strigo estu nia reĝo!

Nu, ili tuj prepariĝis al la kronado. Ili konstruis grandan tronon el foliaj branĉoj ŝutante sur ĝin molajn herbojn, ĉiuspecajn flokojn, poste estis serĉita ankaŭ brilantan oran kronon. Kiam ĉio estis preta, la strigo serioze ekmovis siajn flugilojn kaj ekrapidis al la trono por ke intertempe la birdoj ne ŝanĝu la decidon. Sed ĝuste sursidante la

tronon ĝi aŭdis grakadon. La frugilego demandis:

-Kion vi faras?

La birdoj ne respondis tuj. Ili komencis cerbumi.

-La frugilego estas fama, saĝa birdo. estus bone peti de ĝi konsilon.

Ili iris alla frugilego.

-Mi ĝuste elektas reĝon. Se la reĝa Moŝto ne zorgas pri ni, do ni elektos je reĝo la strigon.

La frugilego ekridis kaj diris:

-Vi estas malsaĝaj, karaj miaj, kial elekti ĉi blindulon, kiam en la mondo estas tiom da bonegaj birdoj, ekzemple frugilego, kolombo, ansero, anaso, pavo kaj la aliaj. Ja la kurbnaza, strabokula strigo estas abomena ankaŭ tiam, kiam ĝi havas bonhumoron. Kia estas ĝi, se ĝi koleras? Ĉu vi kredas, ke la aglo lasos ĝian reĝecon? Verdire, se ĉiu elektus ĝin je reĝo malgraŭ tio mi ne proponas ĝin. Ne forgesu, karaj miaj, unu reĝo estas beno por la lando, sed multaj reĝoj estas malbeno. Kio okazus, se multe da suno brilus sur la ĉielo. La birdoj interrigardis kaj ili feliĉe pepadis: vere!

Fine ili elektis la aglon je reĝo.

Tradukis: Onklo Adalberto



## Gajaj bildoj



Imagu, najbaro, mi ne trovas mian dentoprotezon



## Gajaj bildoj



- Ĉu laboreja akcidento? - Ne, mi forgesis la datrevenon de nia geedziĝa datreveno.

